

Traduko de la portugala Statuto de nia klubo, akceptita de ROTARY INTERNATIONAL, kaj laŭ ties internaj leĝaroj, en aprilo 2017.

Traduko farita de Giuseppe Grattapaglia (protokolisto de la Klubo)

Statuto

Rotary Club de Esperanto-Brasil

(01.05.2017)

Artikolo 1- Difinoj

En ĉi tiu statuto la sekvaj terminoj havas la signifon montratan sube, krom se la kunteksto indikas la kontraŭon:

1. Estraro: la estraro de la klubo.
2. Regularo: la regularo de la klubo.
3. Estrarano: membro de la Estraro.
4. Membro: aktiva membro de la Klubo krom honoraj membroj
5. RI: Rotary International.
6. Satelita Klubo: potenciala klubo kies membroj ankaŭ devos partopreni al tiu ĉi klubo.
7. Jaro: la Rotary-jaro, kiu komenciĝas la 1-an de julio kaj finiĝas la sekvontan 30-an de junio.

Artikolo 2 - Nomo

La nomo de ĉi tiu organizaĵo estos:

Rotary Club de Esperanto-Brasil (Membro de Rotary International).

- (a) La nomo de la Satelita Klubo estos Rotary Klubo Satelita./ de Rotary Club de Esperanto-Brasil.

Artikolo 3 – Propono de la Asocio

La celo de tiu ĉi klubo estas plenumi la objektivon de Rotary, realigi sukcese humanecajn projektojn surbaze de la kvin servo-komisionoj, kontribui al la progreso de Rotary pere de la plifortigo de la membraro, apogi la Rotarian Fondaĵon kaj prepari gvidantojn ekster la medio de la klubo.

Artikolo 4 - Teritoriaj limoj

Kiel elekronika kaj parte ĉeesta klubo, la sidejo estas internacia kun komenca sekretario en Brasília, Prezidanto en Kanado (Vancouver) kaj membroj en diversaj landoj kaj kontinentoj.

Artikolo 5 – Celo

La objektivo de Rotary estas stimuli kaj antaŭenigi la servo-idealon kiel bazo de ĉiu digna aktiveco, akcelante kaj apogante :

Unue. La disvolviĝon de amikeco, kiel elemento kapabla proponi servo-eblecojn;

Due. la diskonigon de alt-nivelaj etikaj principoj en la profesia kaj entreprena vivo, la rekonon de la merito de ĉiu utila okupo kaj la valorigon de la profesio de ĉiuj rotarianoj, kiel ebleco servi la socion.

Trie. La konkretigon de la servo-idealo en la vivo persona, profesia kaj kolektiva de ĉiuj rotarianoj.

Kvare. La disvastigon de la kompreno, bona volo kaj paco inter la nacioj pere de tutmonda reto de profesiuloj kaj entreprenistoj, unuiĝitaj en la servo-idealo.

Artikolo 6 – Kvin servo komisionoj

La kvin komisionoj de servado reprezentas la filozofian kaj praktikan fundamenton de la vivo de tiu ĉi klubo.

1. La *interna agado*: La unua komisiono de rotaria agado, koncernas la aktivecojn, kiujn ĉiu membro devus realigi ene de la klubo por certigi ties bonan funkciadon.

2. La *profesia agado*: La dua komisiono de la rotaria agado, celas stimuli altajn etikajn paradigmojn en la praktikado de ĉiu profesio, rekonante la dignon de ĉiu utila okupo kaj diskonigi la valoron de servado, kiel ideala motivigo en ĉiu profesia aktiveco. La membroj estas vokitaj por kondukti, je persona kaj profesia nivelo, konforme al la principoj de *Rotary International kaj uzi siajn profesiajn talentojn en projektoj ellaboritaj de la klubo por solvi problemojn kaj necesojn de la socio*.

3. La *agado en la komunumo*. La tria komisiono de rotaria agado, rilatas al la iniciatoj de la membroj, kelkfoje kunlaborante kun aliaj organizaĵoj, por plibonigi la kvaliton de la vivo en la internacia komunumo en kiu la klubo agadas.

4. La *internacia agado*. La kvara komisiono de rotaria agado, inkluzivas la aktivecojn plenumitajn de la membroj por akceli la interkomprenon, la bonvolon kaj la pacon inter la popoloj, laborante por la kontakto kun homoj de aliaj landoj, kun iliaj kulturoj, iliaj tradicioj, iliaj problemoj kaj iliaj esperoj, pere de interŝanĝoj kaj partopreno en konferencoj; same ankaŭ pere de kunlaboradoj al iniciatoj kaj projektoj konkretigitaj de la klubo favore al loĝantoj de aliaj landoj.

5. La *agado por la junularo*. La kvina komisiono de rotaria agado, rekonas la pozitivan efikon sur la vivo de geknaboj kaj adoleskantoj danke al aktivecoj, kiuj stimulas ties gvidkapablojn, ilian volontuladon en ilia komunumo, en internacia servado kaj interŝanĝoj, kiuj favoras la pacon kaj la tutmondan interkomprenon.

Artikolo 7- Esceptoj rilate la normojn pri kunvenoj kaj frekvenco.

La Interna regularo povas inkluzivi normojn aŭ postulojn ne konformajn al Sekcio 1 de Art. 8; Art. 12 kaj Sekcio 4 de Art. 15 de tiu ĉi Statuto. Tiaj normoj aŭ postuloj anstataŭos la normojn kaj postulojn de la koncernaj sekcioj de tiu ĉi Statuto. Tamen, ĉiu klubo devos renkontiĝi minimume du foje monate.

Artikolo 8 – Kunvenoj

Sekcio 1- Ordinara kunvenoj. (vidu art 7 pri esceptoj kaj postuloj de tiu ĉi Sekcio).

(a) *Tago kaj horo de kunveno.* La klubo kunvenos regule minimume tri foje monate en tago kaj horo difinitaj en la interna regularo. La partopreno okazos elektronike pere de konekto en la retejo en la internacia lingvo Esperanto.

(b) *Ŝanĝoj.* Pro validaj motivoj, la estraro rajtas prokrasti ordinaran kunvenon al alia dato kaj horo. (ĉiukaze antaŭ la posta kunveno.)

(c) *Nuligoj.* La estraro povas nuligi ordinaran kunvenon, se ĝi okazas en festotago, inkluzive en festoj kutime observataj, aŭ en kazo de morto de iu membro aŭ en kazo de esceptaj eventoj (ekz. epidemioj, katastrofoj, militaj eventoj). La estraro povas nuligi ne pli ol kvar ordinarajn kunvenojn jare pro kaŭzoj malsamaj de tiuj listigitaj supre; maksimume eblas nuligi tri sinsekvajn kunvenojn.

(d) *Kunveno de Satelita Klubo.* Se antaŭvidita en la interna regularo, la satelita klubo realigos siajn kunvenojn interkonsente kun la membroj. La tago kaj horo povas ŝanĝiĝi kiel indikite en la Sekcio 1(c) de tiu ĉi artikolo. La elektaj proceduroj estas konformaj al la Interna Regularo.

Sekcio 2. Jara Asembleo

(a) La regularo difinas, ke la jara Asembleo por elekto de la estraro okazu ne post la 31-a de decembro.

(b) La satelita klubo kunvokos la jaran asembleon de siaj membroj antaŭ la 1^a de decembro por elekti sian estraron.

Sekcio 3. Kunvenoj de la estraro

Pri ĉiuj kunvenoj de la estraro devos esti redaktita skriba protokolo, je dispono de la membroj, en la dat-limo de 60 tagoj post la kunveno.

Artikolo 9 – Esceptoj rilate la normojn pri la membraro

La interna regularo povas inkluzivi normojn aŭ postulojn ne konformajn al Sekcioj 2 kaj 4-8 de la Artikolo 10 de tiu ĉi Statuto. Tiuj normoj aŭ postuloj anstataŭos la normojn aŭ postulojn de la koncernaj sekcioj de ĉi tiu Statuto.

Artikolo 10- Membraro (Vidu Art. 9 pri la esceptoj al postuloj de la Sekcioj 2 kaj 4-8 de ĉi tiu artikolo).

1. Ĝeneralaj kondiĉoj. La klubo konsistas el bonkarakteraj plenkreskuloj kun modela profesia kaj socia reputacio, kiuj havas gvidkapablojn kaj esti kapablaj volontuli por la bono de la socio ĉie en la mondo.

2. Kategorioj de membroj. La klubo havas du kategoriojn de membroj: aktivaj kaj honoraj.

3. Aktivaj membroj. Rajtas esti aktiva membro de la klubo ĉiu kiu posedas la kondiĉojn difinitajn en artikolo 5-a, paragrafo 2-a, de la statuto de *Rotary International*.

4. Membriĝo en satelita klubo. La anoj de la satelita klubo devas esti membroj ankaŭ de la subtenanta klubo ĝis kiam la satelita klubo estos rekonita kiel Rotary Klubo fare de Rotary International

5. Duobla membreco. Neniu rotariano povos esti samtempe aktiva membro en tiu ĉi kaj en alia klubo, escepte se en la satelita klubo de tiu ĉi Rotary Klubo. Krome, neniu rotariano povos esti samtempe membro aktiva kaj honora de tiu ĉi klubo.

6. Honora membreco.

a) Elekto en la kategorio Honora Membro. Personoj kiuj distingiĝis en la servo al la idealo de Rotary aŭ estas amikoj de nia organizaĵo, povas esti elektitaj

kiel honoraj membroj de tiu ĉi klubo por periodo difinita de la estraro. La honoraj membroj povas aparteni al pli ol unu klubo.

b) Rajtoj kaj privilegioj. La honoraj membroj estas liberaj de la pago de asociaj kotizoj, ne rajtas voĉdoni, nek povas havi oficon en la estraro de la klubo. Kvankam ili ne reprezentas iun ajn kategorion, ili rajtas partopreni al ĉiuj kunvenoj de la klubo kaj ĝui ĉiujn privilegiojn de la membroj de tiu ĉi klubo. Ili ne rajtas al privilegioj en aliaj kluboj.

7. Publikaj oficoj. Personoj elektitaj aŭ nomumitaj, por limigita periodo de tempo, al publikaj oficoj, ne povos esti konsiderataj aktivaj membroj de tiu ĉi klubo en la kategorio de tiu provizora ofico. Tiu limigo ne validas por tiuj, kiuj okupas oficojn en lernejoj, universitatoj kaj en iu ajn eduka institucio aŭ en juĝistaj instancoj.

8. Posteno en Rotary International. Tiu ĉi klubo povas havi membrojn, kiuj estas funkciuloj de Rotary International.

Artikolo 11- Klasifikoj

Sekcio 1. Ĝeneralaj normoj

a) *Ĉefa aktiveco.* Ĉiu aktiva membro estos klasifikita laŭ la respektiva kategorio de negoco, profesio aŭ socia servo.

La kategorio estos tiu, kiu priskribas la ĉefajn rekonitajn aktivecojn de la firmao, korporacio aŭ institucio, al kiu la membro estas ligita, aŭ tiu kiu priskribas la ĉefan rekonitan aktivecon de sia entrepreno aŭ profesio aŭ la tipo de socia servo.

b) *Korekto aŭ modifo.* Se cirkonstancoj tion motivigas, la estraro povas korekti aŭ modifi la klasifikon de iu ajn membro. Tiu ĉi estos informita pri la korekto aŭ modifo kaj rajtos esti tiurilate konsultita.

Sekcio 2. Limigoj

La klubo ne devos elekti, en la kategorio de aktiva membro, iun jam reprezentita en la klubo per minimume kvin membroj, escepte kiam la klubo havas pli ol 50 membroj, kazo, kiu ebligas la elekton de novaj aktivaj membroj por iu sama klasifiko ĝis la ekvivalento de 10% de la aktivaj membroj de la klubo. Emeritoj ne estas konsiderataj en la kalkulo de la nombro de personoj, kiuj reprezentas la klasifikon. La klasifiko de eks-rotariano aŭ de rotariano, kiu translokiĝas, aŭ de rotaraktiano aŭ eks-partoprenanto de programo de Rotary difinito de la estraro de R.I., ne malhelpos la elekton de tiu membro kiel aktiva membro, eĉ se kiel rezulto de tiu elekto la membraro de la klubo superos provizore la menciitajn limigojn.

Artikolo 12 – Frekvenco (vidu la Artikolon 7 pri la esceptoj de la normoj de tiu ĉi sekcio)

Sekcio 1 - Ĝeneralaj normoj. Ĉiu membro devas ĉeesti la ordinarajn kunvenojn de tiu ĉi klubo, aŭ la kunvenojn de la satelita klubo, se indikite en la Interna Regularo kaj partopreni la projektojn, eventojn kaj aktivecojn de tiu ĉi klubo. La membro ricevos krediton de frekvenco se ĉeestos fizike aŭ per konekto on-line, minimume 60% de la kunvenoj, aŭ se, ĉeestante, devos subite eliri kaj poste pravigi, antaŭ la estraro de tiu ĉi klubo, ke tiu sinteno estis necesa, aŭ partopreni ordinarajn kunvenojn en la website de la klubo post unu semajno de iliaj okazigoj aŭ pravigi la ne ĉeeston laŭ jena proceduro:

(a) 14 tagoj antaŭ aŭ post la kunveno. Se en iu ajn tago de la periodo inkluzivita inter 14 tagoj antaŭ kaj 14 tagoj post la tago kaj la normala horo de ordinara kunveno de tiu ĉi klubo, la membro:

1) ĉeestas minimume 60% de ordinara kunveno de alia klubo, de kunveno de satelita klubo de alia klubo aŭ de provizora klubo aŭ:

(2) ĉeestas la ordinaran kunvenon de Rotarakt-klubo aŭ de provizora Rotarakt-klubo aŭ de Interakt-klubo aŭ de provizora Interakt-klubo aŭ de Rotary Nukleo de Komunuma Disvolviĝo aŭ de provizora Rotary Nukleo de Komunuma Disvolviĝo aŭ de Grupo de Rotary Amikaro aŭ Grupo provizora de Amikaro aŭ:

(3) partoprenas al monda kongreso de Rotary International, al Leĝodona Konsilantaro, al Internacia Asembleo, al Rotary Instituto por administrantoj aktualaj kaj antaŭaj de R.I., al Rotary Instituto por administrantoj aktualaj, antaŭaj kaj enirantaj de R.I. kunvokita laŭ aprobo de la estraro de R.I. aŭ de la prezidanto de R.I. en la nomo de la estraro de R.I., al Konferenco Multregiona de R.I., al kunveno de la komisiono de R.I. al Distrikta Konferenco, al Distrikta Asembleo de Trejnado, al iu ajn kunveno de la distrikta komisiono realigita laŭ instrukcio de la estraro de R.I., al iu ajn kunveno de la distrikta komisiono realigita por instrukcio de la distrikta guberniestro aŭ al kunveno interkluboj oportune kunvokita. aŭ

(4) sin prezenta en horo kaj loko de la ordinara kunveno aŭ kunveno de la satelita klubo aŭ de alia klubo, kun la intenco ĉeesti, se tiu klubo ne kunvenas en tiu loko kaj horo: aŭ

(5) partoprenas projektojn de internaj servoj, de komunumaj eventoj organizitaj de la klubo aŭ de kunvenoj rajtigataj de la estraro; aŭ

(6) partoprenas la kunvenon de la estraro aŭ, se rajtigita de ĉi tiu estraro, la kunvenon de la komisiono en kiu la membro estis indikita; aŭ

(7) partoprenas aktivecojn interaktivajn en la retejo (website) de la klubo, kies mez-daŭro estu 30 minutoj.

Kiam la membro vojaĝas eksterlande dum pli ol 14 tagoj ne devos obei la dat-limon ĉi tie indikita por partopreni la ordinarajn kunvenojn aŭ la kunvenojn de satelita klubo aŭ de lokaj satelitaj kluboj en iu ajn okazo dum la daŭro de la vojaĝo. Tiu partopreno estos konsiderata valida anstataŭo de la ordinaraj kunvenojn, kiujn li/ŝi ne partoprenis en sia klubo pro motivo de vojaĝo.

(b) Okaze de la realigo de la kunveno.

Se okaze de la realigo de ordinara kunveno la membro:

(1) estos veturanta, laŭ plej rekta vojo, por partopreni, aŭ post la partopreno al unu el la kunvenoj menciitaj supre, en la Subsekcio(a)(3), aŭ

(2) estante je la servo de Rotary en la funkcio de administranto aŭ membro de komisiono de RI, aŭ kuratoro de la Rotary Fondaĵo; aŭ

(3) estante je la servo de Rotary kiel speciala reprezentanto de la distrikta guberniestro dum la fondo de nova klubo; aŭ

(4) estante je la servo de Rotarj kiel funkciulo de RI; aŭ

(5) dum partopreno, rekte kaj aktive, de projekto sub la patroneco de la distrikto, de RI aŭ de la Rotary Fondaĵo en regiono kie ne eblas pravigi la foreston; aŭ

(6) estante je la servo de Rotary, laŭ rajtigo de la estraro, sen ebleco partopreni la kunvenon.

Sekcio 2- Longdaŭra foresto pro speciala misio.

Se la membro estas laboranta dum longa periodo de tempo en speciala misio, lia/ŝia partopreno en la kunvenoj de la klubo indikita en la loko de la menciita misio, pravigos la foreston de la kunvenoj de la propra klubo, kondiĉe ke ekzistu interkonsento de la kluboj.

Sekcio 3 – Rajtigitaj forestoj. La membro estos liberigita de la postuloj pri frekvenco kiam:

(a) la foresto okazas laŭ kondiĉoj aprobitaj de la estraro de la klubo, ĉar tiu estraro rajtas pravigi la forestojn, kiuj laŭ ĝi okazis pro validaj motivoj. Tiaj forestoj ne povas daŭri pli ol 12 monatoj. Tamen se la foresto okazis pro motivo de sano, aŭ post iu naskiĝo, adopto aŭ familia gastigo de infano kaj daŭras pli ol 12 monatoj, ĝia plilongiĝo povos esti pravigita de la estraro por periodo pli longa ol la originaj 12 monatoj.

(b) la sumo de la aĝo de rotariano plus la nombro de jaroj dum kiuj li/ŝi estis membro de unu aŭ pliaj kluboj, atingas la totalon de 85 jaroj kaj, krom tio, se la rotariano estis membro de unu aŭ pliaj kluboj dum minimume 20 jaroj kaj informis skribe la sekretarion de la klubo pri la deziro de tiu liberigo de frekvenco, laŭ interkonsento kun la estraro.

Sekcio 4. Foresto de administrantoj de RI. Iu ajn membro kiu plenumas taskon kiel administranto de RI aŭ estas partnero de administranto de RI, ricevos liberigon de sia frekvenco.

Sekcio 5. Registro de frekvenco. Se la membro, kies forestoj povas esti pravigitaj laŭ la normoj de la Subsekcio 3 (a) de tiu ĉi artikolo, ne partoprenos kunvenon de la klubo, la membro kaj ĝia foresto ne aperos en la registro de frekvenco de la klubo. Se la membro, kies forestoj povas esti pravigitaj laŭ la normoj de Subsekcio 3 (b) aŭ Sekcio 4 de tiu ĉi artikolo, partoprenos kunvenon de la klubo, la membro kaj ĝia ĉeesto aperos en la registro de frekvenco de la klubo.

Artikolo 13 – Direktoroj, Estraranoj kaj Komisionoj

Sekcio 1 - Estrara Organo – La estrara organo de tiu ĉi klubo estos la estraro starigita laŭ la normoj de la Interna Regularo.

Sekcio 2 – Povo - La estraro havos ĝeneralan kontrolon pri ĉiuj estraranoj kaj komisionoj kaj, pro ĝusta kaŭzo, povos deklari vakanta iun ajn postenon.

Sekcio 3 - Respondeco de definitiva decido de la estraro. La estrara decido en ĉiuj aferoj de la klubo, estos definitiva, submetita nur al kluba apelacio. Tamen, en la kazo de malpligrandigo de la membraro, la membro, laŭ la Sekcio 6 de la artikolo 15, povos apelacii al la klubo, solliciti mediacion aŭ solliciti arbitracion. En kazo de apelacio, la decido de la estraro nur estos nuligita per la favora voĉo de du trionoj de la membroj ĉeestantaj la ordinaran kunvenon indikita de la estraro en kiu estu kvorumo, kondiĉe ke la sekretario de la klubo informis ĉiujn membrojn de la klubo minimume 5 tagojn antaŭ la dato de la kunveno. En kazo de apelacio, la decido de la klubo iĝas definitiva.

Sekcio 4 – Estraranoj. La estraranoj de tiu ĉi klubo konsistos el prezidanto, lasta prezidanto, elektita prezidanto, sekretario kaj trezoristo, kun ebleco aldoni unu aŭ pli vic-prezidantojn, kiuj estos membroj de la estraro. La direktoro de protokolo ankaŭ povos esti estrarano de la klubo kaj aparteni al la estraro, laŭ la Interna Regularo. La estraranoj de la klubo devos regule ĉeesti.

Sekcio 5 - Elekto de la estraranoj.

(a) Mandato de la estraranoj, escepte de la prezidanto.

Ĉiu estrarano estos elektita laŭ la reguloj establitaj en la Interna Regularo. Escepte en la kazo de la prezidanto, la estraranoj enposteniĝos la 1-an de julio post sia elekto, servante dum la periodo de sia mandato aŭ ĝis kiam estu elektita ilia posteulo, laŭ la necesaj kondiĉoj.

(b) Mandato de la prezidanto. La prezidanto estos elektita laŭ kio indikite en la Interna Regularo, t.e. maksimume du (2) jarojn kaj minimume dekok (10) monatojn antaŭ la dato en kiu li/ŝi enposteniĝos kiel indikita prezidanto post la koncerna elekto. La indikita prezidanto estos konata kiel elektita prezidanto ek de la 1^a de julio de la antaŭa jaro kiam komenciĝos lia/ŝia mandato kiel prezidanto. Li/ŝi enposteniĝos la 1-an de julio kaj servos dum unu jaro aŭ ĝis kiam estos elektita lia/ ŝia posteulo, laŭ la necesaj kondiĉoj.

(c) Kvalifikoj - Ĉiu estrarano devos esti membro aktiva kaj ĝisdata kun la sindevigoj de tiu ĉi klubo.

La kandidato al prezidanteco devos servi kiel aktiva membro de tiu ĉi klubo, dum almenaŭ unu jaro antaŭ la kandidatiĝo, escepte se la servo dum malpli unu jaro estos konsiderata kontentiga fare de la distrikta guberniestro.

La elektita prezidanto, krom se rajtigita de la elektita guberniestro, devos partopreni la Seminarion pri Trejnado de la Elektitaj Prezidantoj (PETS) kaj la Distriktan Asembleon de Trejnado. Se liberigita, la elektita prezidanto devos sendi reprezentanton de sia klubo, kiu poste devos raporti kaj transdoni la informojn ricevatajn. Se la elektita prezidanto ne partoprenos la PETS kaj nek la Distriktan Asembleon de Trejnado, ne estos liberigita de tiu partopreno fare de la elektita guberniestro kaj, en kazo de rajtigita foresto, ne sendis reprezentanton de la klubo, li/ŝi ne rajtos enposteniĝi kiel prezidanto de la klubo. En tiu ĉi kazo la aktuala prezidanto devas daŭrigi en la posteno ĝis kiam lia posteulo, kiu partoprenis PETS kaj la Distriktan Asembleon pri Trejnado aŭ la trejnadon konsiderata sufiĉa de la elektita guberniestro, estos elektita.

Sekcio 6 – Guberniestra sidejo de la satelita klubo.

La satelita klubo funkcios en la sama loko de tiu ĉi klubo aŭ en la ĉirkaŭaĵoj.

(a) Superrigardo de la satelita klubo. La subtenanta klubo devos superrigardi kaj apogi la satelitan klubon.

(b) Estraro de la satelita klubo. La satelita klubo povos jare elekti, inter siaj membroj, tiujn kiuj formos sian estraron por zorgi la ĉiutagajn funkciojn de la klubo. Krom la estraranoj de la satelita klubo, la estraro povos havi inter kvar ĝis ses aldonajn integrantojn konforme difinite en la Interna Regularo. La estrarano, je plej alta posteno, estos la prezidanto kaj la aliaj estraranoj estos la lasta prezidanto, la elektita prezidanto, la sekretario kaj la trezoristo.

La estraro respondecos pri la ĉiutagaj aktivecoj kaj pri la administrado de la satelita klubo laborante laŭ la normoj, la politikaj postuloj, la celoj kaj objektivoj de Rotary, sub la orientigo de la subtenanta klubo. La estraro de la satelita klubo havos nenian aŭtoritaton sur la subtenanta klubo.

(c) Livero de raportoj. Ĉiu satelita klubo devos jare sendi al la prezidanto kaj al la estraro de la subtenanta klubo, jaran raporton pri sia membraro, programoj kaj aktivecoj kune kun la financa raporto kaj la raporto de la kont-revizoroj, por esti inkluzivitaj en la raporto, kiun la subtenanta klubo prezentos dum la jara ĝenerala kunveno, same kiel aliaj raportoj, kiujn la subtenanta klubo juĝos necesaj.

Sekcio 7 – Komisionoj – Tiu ĉi klubo havos jenajn komisionojn: Administrado - Membraro - Publika Prezentiĝo – Rotary Fondaĵo – Humanecaj Projektoj .

Aldonaj komisionoj povos esti laŭnecese starigitaj.

Artikolo 14 – Kotizoj

Ĉiu membro pagos la jaran kotizon indikita en la Interna Regularo.

Artikolo 15 - Daŭro de la titolo de membro.

Sekcio 1 -Dat-limo. La titolo de membro daŭros dum la tuta ekzisto de tiu ĉi klubo, escepte kiam nuligita laŭ la sekvantaj normoj.

Sekcio 2 - Aŭtomata nuligo

(a) Kvalifiko por esti membro. La titolo de membro estos aŭtomate nuligita kiam li/ŝi, ne plu posedos la kvalifikojn por partopreni la membraron, escepte kiam:

(1) la estraro povos koncedi al la membro, kiu translokiĝos de la loko de tiu ĉi klubo aŭ de la ĉirkaŭaĵoj, liberigon de maksimume unu jaro por povi viziti kaj konatiĝi kun la Rotary Klubo de la nova komunumo, kondiĉe ke daŭrigu plenumi ĉiujn kondiĉojn por esti membro de la Klubo.

(2) La estraro povas permesi al la aktiva membro, kiu translokiĝos de la loko de tiu ĉi klubo aŭ de la ĉirkaŭaĵoj, la konservon de sia kondiĉo de membro se daŭrigos plenumi ĉiujn kondiĉojn por esti membro de la klubo.

(b) Kiel reveni. Kiam la membreco ĉesos, kiel indikite en la Subsekcio (a) de tiu ĉi sekcio, la membro povos solicii novan membriĝon, ĉu en la sama aŭ en alia klasifiko, kondiĉe ke, okaze de tiu ĉesigo, li/ŝi estis ĝisdata kun la sindevigoj de la klubo.

(c) Ĉeso de membriĝo de honora membro. La membriĝo de honora membro aŭtomate ĉesos je la fino de la periodo difinita de la estraro por tiu ĉi kategorio de membro. Tamen la estraro povos, laŭ sia juĝo, plilongigi tiun titolon por aldona periodo. La estraro povas nuligi, en iu ajn okazo, la membrecon de honora membro.

Sekcio 3 – Ĉesigo – Ne pago de kotizoj.

(a) Proceduro – Iu ajn membro, kiu ne pagas la kotizon en la daŭro de tridek (30) tagoj post la dat-limo establita, estos skribe avertita de la sekretario en sia lasta adreso. Se la kotizo ne estos pagita en la daŭro de dek (10) tagoj post la averto, la titolo de la membro povos esti nuligita de la estraro.

(b) Realigo. La estraro povos realigi la eks-membron, laŭ ties peto kaj pere de pago de lia/ŝia ŝuldo kun la klubo. Tamen neniu eks-membro povos esti realigita, se lia antaŭa klasifiko estas en konflikto kun la Sekcio 2 de Artikolo 11.

Sekcio 4 – Ĉesigo - Manko de frekvenco. Vidu la Artikolon 7 pri la esceptoj de la normoj de tiu ĉi sekcio.

(a) Procentaĵo de frekvenco. Ĉiu membro devos :

(1) ĉeesti aŭ pravigi la foreston de minimume 50% de la ordinaraj kunvenoj aŭ de la kunvenoj de la satelita klubo aŭ, se partoprenas en projektoj, aktivecoj aŭ eventoj de la klubo dum almenaŭ 12 horoj en ĉiu semestro de la Rotary jaro, aŭ dum proporcia kombino de ambaŭ.

(2) ĉeesti minimume 30 % de la ordinaraj kunvenoj aŭ kunvenoj de la satelita klubo, aŭ partopreni projektojn, aktivecojn aŭ eventojn de tiu ĉi klubo en ĉiu semestro de la jaro (asistantaj guberniestroj, laŭ difino de la estraro de RI , estos liberigitaj de tiu ĉi normo). Se la membro ne obeos la supran normon, lia/ŝia membreco povos esti nuligita, escepte se la estraro pravigos la foreston.

(b) Sinsekvaj forestoj. Escepte se liberigite de la estraro por motivoj pravigitaj, aŭ konforme al la normoj de la Sekcioj 3 aŭ 4 de la Artikolo 12, la membro kiu forestas aŭ ne pravigas la foreston dum kvar sinsekvaj kunvenoj, estos informita de la estraro, ke liaj/ŝiaj forestoj povas esti konsiderataj kiel peto de demisio de la klubo. Post tiu averto la estraro, per plimulta voĉdono, povos demisii la membron.

Sekcio 5 – Aliaj kaŭzoj de ĉesigo.

(a) Justa kaŭzo. La titolo de iu ajn membro, kies kvalifiko ne plu validas, aŭ pro alia valida kaŭzo, povas esti nuligita de la estraro per voĉdono de minimume du trionoj de la ĉeestantaj membroj dum kunveno tiucele kunvokita.

La principoj de tiu ĉi kunveno devas esti tiuj indikitaj en la Sekcio 1 de la Artikolo 10, en la Provo de la Kvar Demandoj kaj laŭ la altaj etikaj valoroj propraj de la rotarianoj.

(b) Averto - Antaŭ ol obei la normojn de la Subsekcio (a) de tiu ĉi sekcio, la membro estos skribe informita dek (10) tagojn antaŭe, por ebligi al li/ŝi respondi skribe al la estraro.

Li/ŝi rajtos persone ĉeesti, antaŭ la estraro por prezenti sian defendon. La averto estos liverita pere de komisiito, aŭ per registrita letero sendita al la lasta konata adreso de la membro.

(c) Kompletigo de klasifiko. Kiam la estraro nuligis la titolon de iu membro laŭ la normoj de tiu ĉi sekcio, la klubo ne povos elekti novan membron por reprezenti la klasifikon kiun la eks-membro okupis, ĝis kiam finiĝos la tempo por prezenti defendon kaj la estraro aŭ la arbitra juĝisto anoncis sian decidon. Tamen tiu ĉi normo ne estos aplikita se, per la elekto de la nova membro, la nombro de membroj en tiu ĉi klasifiko restas en la difinitaj limoj, eĉ se la decido de la estraro pri la ĉesigo de la titolo, estu nuligita.

Sekcio 6 – Rajto pri defendo, mediacio aŭ arbitracio en kazo de ĉesigo

(a) Averto. En la daŭro de sep (7) tagoj ek de la decido de la estraro, ĉesigi aŭ suspendi la titolon de membro, la sekretario skribe informos la interesiton pri la decido. En la daŭro de dekkvar (14) tagoj, post tiu averto, la membro povos skribe komuniki al la sekretario la intencon prezenti sian defendon, al la klubo, peti mediacion aŭ starigi arbitracion surbaze de Artikolo 19 de tiu ĉi Statuto.

(b) Dato de la juĝo de defendo – En la kazo ke estis prezentita defendo, la estraro fiksos la daton de ĝia juĝo, dum ordinara kunveno de la klubo, en la daŭro de dudekunu (21) tagoj post la ricevo de la informo pri defendo. La skriba informo pri tiu kunveno kaj la speciala temo traktita, estos sendita al ĉiuj membroj, minimume kvin (5) tagojn antaŭ la dato fiksita. Nur membroj rajtos ĉeesti la juĝon de la defendo.

(c) Mediacio aŭ arbitracio - La proceduro, en la kazo de mediacio aŭ arbitracio, estos tiu indikita en la Artikolo 19.

(d) Apelacio – En kazo de defendo, la decido de tiu ĉi klubo estos definitiva kaj deviga por ĉiuj partioj, sen rajto al arbitracio.

(e) Decido de la arbitracianto aŭ de la juĝisto. Se estis solicitita arbitracio, la decido de la arbitracianto aŭ, en kazo de disputo, de la juĝisto, estos definitiva kaj deviga por ĉiuj partioj, sen rajto al defendo.

(f) Malsukceso de mediacio. Se estis solicitita mediacio kaj tiu malsukcesis, la membro povos peti defendon al la klubo aŭ peti la starigon de arbitracio, kiel antaŭvidite en la Subsekcio (a) de tiu ĉi sekcio.

Sekcio 7 - Respondeco de fina decido de la estraro. La decido de la estraro, se ne estis apelaciita al la klubo aŭ ne estis sollicitita arbitracia juĝo, estos definitiva.

Sekcio 8 – Rezigno. La rezigno de iu ajn membro de tiu ĉi klubo devos esti skribe prezentita (al la prezidanto aŭ al la sekretario) kaj akceptita de la estraro, kondiĉe ke la membro pagis ĉiujn siajn ŝuldojn kun la klubo.

Sekcio 9 – Perdo de rajtoj pri sociaj havaĵoj. Iu ajn persono, kies titolo de membro en tiu ĉi klubo estis nuligita pro iu ajn motivo, rezignos pri la rajto sur iu ajn fonduso aŭ aliaj posedaĵoj de la klubo, se, konforme la lokajn leĝojn, la membro akiris rajton pri ili post la aliĝo al la klubo .

Sekcio 10 – Portempa suspendo. Sendepende de iu ajn normo de tiu ĉi Statuto, se la estraro opinias ke:

(a) la akuzoj, ke la membro rezignis plenumi aŭ ignoris la normojn de tiu ĉi Statuto, estis veraj , aŭ se la membro estis konsiderata kulpa pri sinteno neadekvata aŭ danĝera por la interesoj de la Kluboj; kaj

(b) tiaj akuzoj, se pruvitaj, konsistigas sufiĉan kaŭzon por nuligi la titolon de la membro; kaj

(c) nenia providenco, pri la membreco de la rotariano, devas esti konsiderata ĝis kiam estu solvita la pendanta proceso aŭ iu difinita evento okazu antaŭ la nuligo de la titolo de la membro.

(d) estas intereso de la klubo, kaj sen voĉdono de la membraro, ke la membro estu portempe suspendita, ĉi lasta ne devas esti rajtigita ĉeesti la ordinarajn kunvenojn nek la aliajn aktivecojn de la klubo kaj devas esti suspendita de siaj administraj funkcioj en la klubo. La estraro povos, pere de voĉdono de plimulto de du trionoj de siaj membroj, portempe suspendi la membron dum ne pli ol 90 tagoj kaj laŭ la necesaj kondiĉoj. Suspendita membro povas peti apelacion, mediacion aŭ arbitracion, kiel antaŭvidite en la Sekcio 6 de la Artikolo 15. Laŭ tiu ĉi normo, la membro estos liberigita de la frekvenco. Antaŭ la fino de la portempa suspendo, la estraro devos daŭrigi la proceduron por nuligi la membriĝon de la suspendita membro aŭ restarigi lian/ŝian regulan membrecon.

Artikolo 16 Temoj komunumaj, naciaj, kaj internaciaj.

Sekcio 1 – Specifaj temoj. Iu ajn temo kiu pritraktas la ĝeneralan bonfarton de la komunumo, de la lando aŭ de la mondo interesas la membrojn de ĉi tiu klubo kaj povas esti studata kaj debatita en maniero justa kaj senpartia dum la kunvenoj de la klubo por klerigo de la rotarianoj en la formado de iliaj individuaj opinioj. Tamen tiu ĉi klubo ne povos esprimi opiniojn pri aferoj publike diskutataj.

Sekcio 2 – Ne estos faritaj rekomendoj.

Tiu ĉi klubo ne apogos nek rekomendos kandidatojn por publikaj oficoj, nek diskutos, dum siaj kunvenoj, pri la meritoj aŭ malmeritoj de tiaj kandidatoj.

Sekcio 3 – Nepolitikeco.

(a) Rezolucioj kaj opinioj. Tiu ĉi klubo ne adoptos, nek cirkuligos rezoluciojn aŭ

opiniojn, nek prenos decidojn pri aferoj aŭ internaciaj problemoj de politika naturo.

(b) Apelacioj. Tiu ĉi klubo ne direktos apelojn al kluboj, personoj aŭ registaroj kaj ne sendos leterojn, paroladojn aŭ planojn por la solvo de internaciaj problemoj de politika naturo.

Sekcio 4 - Celebrado de la originoj de Rotary.

La semajno de la datreveno de lo fondo de Rotary (23-a de februaro) , estas kiel la Semajno de Paco kaj Tutmonda Interkompreno. Dum tiu semajno tiu ĉi klubo festos la servojn realigitajn de Rotary, pripensos la objektivajn atingitajn kaj emfazos la programojn por la paco kaj bona volo en la monda komunumo.

Artikolo 17 – Rotariaj Revuoj

Sekcio 1 - Deviga abono - Se tiu ĉi klubo, konforme la Interna Regularo de RI, ne estas liberigita de la Konsilio RI plenumi la normojn de tiu ĉi artikolo, ĉiu membro devos aboni la oficialan revuon aŭ la regionan revuon aprobita de la Estraro de RI por la tuta daŭro de membreco. Du rotarianoj loĝantaj ĉe la sama adreso povas peti nur unu solan abonon. La abono pagiĝas ĉiujn ses monatojn por la daŭro de membreco al la klubo kaj ĝis la fino de la semestro en kiu la membro ĉesas esti parto de la klubo.

Sekcio 2 - Pago de Abono La klubo havas la taskon kolekti la sumojn rilatajn al la abonoj de la membroj anticipe ĉiujn semestrojn kaj transpagi ilin al la Sekretariejo de RI aŭ al la kontinenta RI oficejo, surbaze de la decidoj de la Centra Konsilio RI.

Artikolo 18 - Akcepto de la celo kaj respekto al la statuto kaj al la regularo

Per la pago de la aliĝ- kotizo kaj de la sociaj kotizoj, la membro akceptas la principojn de *Rotary International*, kiel ili estas esprimitaj en ties celo, kaj sindevigas observi la statuton kaj la regularon de tiu ĉi klubo, kaj fakte membriĝas, kaj nur sub tiuj kondiĉoj, li/ŝi havas la rajton je la privilegioj de la klubo. Neniu membro povas esti liberigita de la observado de la statuto kaj de la regularo kun la *senkulpigo ne esti ricevinta kopion*.

Artikolo 19 - Arbitracio kaj mediacio

Sekcio 1. Konfliktoj. En kazo de disputo inter iu membro aŭ eksa membro kaj la klubo, iu estrarano aŭ la Estraro, pri temo kiu ne rilatas al decido de la Estraro kaj kiu ne povas esti solvita de la proceduro priskribita en tiuj kazoj, la disputo estos raportita, pere de peto al la sekretario de unu el la du partioj, al mediacio aŭ al arbitracia kolegio.

Sekcio 2. Dato. La Estraro, aŭdinte la koncernajn partiojn, devas fiksi la daton de la mediacio aŭ arbitracio ene de kaj ne post dudek unu tagoj de la peto.

Sekcio 3. Mediacio. Mediacio okazas laŭ la proceduro agnoskita de la institucio aŭ rekomendita de kompetenta organo de mediacio kiu havas sperton en

alternativa rezolucio de kvereloj aŭ estas rekomendita de la gvidlinioj de la centra konsilio RI aŭ la administra Konsilio de la Rotaria Fondaĵo. Nur klubmembro povas esti enoficigita kiel mediaciisto.

La klubo povas peti ke estu la distrikta guberniestro aŭ lia reprezentanto, kiu nomumu la mediaciiston, ĉiam membro de iu klubo, kiu havu la kapablojn kaj necesan sperton.

(a) *Rezultoj de la mediacio*: la decidoj faritaj interkonsente de la partoj dum la mediacio, estos registritaj kun kopio sendita al ĉiuj partoj al la mediaciisto kaj al la Estraro, kiu deponos sian propran ekzempleron ĉe la sekretario. Devas do esti preparita resumo de la solvo interkonsentita de la partioj. Se la konflikto ne estas klarigita, ĉiu partio rajtas peti pluajn mediaciajn kunvenojn.

(b) *Malsukceso de la mediacio*: se la mediacio malsukcesas, unu el la partioj povas peti la aliron al arbitracio laŭ Sekcio 1 de tiu ĉi artikolo.

Sekcio 4. Arbitracio. Kaze de arbitraciado, ĉiu partio nomumas unu arbitracianton kaj la arbitraciantoj nomumos juĝiston. Arbitraciantoj kaj juĝistoj devas esti membroj de Rotaria klubo.

Sekcio 5. Arbitracia decido. La decido de la arbitraciantoj aŭ, se ili alvenas al malsamaj solvoj, de la juĝisto de la arbitracia kolegio estos definitiva, deviga kaj nekontestebla.

Artikolo 20 - Interna Regularo

Tiu ĉi klubo aprobas regularon, kiu estu kongrua kun la statuto kaj la regularo de RI, kun la specifaj normoj de la loka teritorio en la kazo ili estas establitaj de RI, kaj kun ĉi tiu statuto. Tiu regularo povas aldoni necesajn ŝanĝojn laŭ la propraj normoj.

Artikolo 21 - Interpretado

La uzo de la vorto "poŝto", en ajna formo, en ĉi tiu statuto, signifas la uzon de ambaŭ tipoj, tradicia kaj elektronika poŝto (e-poŝto), tiu ĉi lasta kiel instrumento por redukti la kostojn kaj optimumigi la respondajn tempojn.

Artikolo 22 - Amendoj

Sekcio 1. Metodoj. Krom la plena respekto de la Sekcio 2 de tiu ĉi artikolo, ĉi tiu statuto povas esti amendita nur de la Leĝa Konsilantaro laŭ la maniero preskribita de la statutoj de RI por la amendo de si mem.

Sekcio 2. Amendo de la artikoloj 2 kaj 4. La artikoloj 2 (Nomo) kaj la artikolo 4 (limoj teritoriaj) de ĉi tiu statuto povas esti modifitaj en ajna regula kunveno de la klubo kun la necesa kvorumo de du trionoj de la membroj ĉeestantaj kaj voĉdonantaj, kondiĉe ke la proponita amendo estu komunikita skribe al ĉiuj membroj kaj al la guberniestro almenaŭ dek tagoj antaŭ la kunveno, kaj kondiĉe ke tiu amendo estos submetita al la aprobo de la Centra Konsilio RI kaj ekvalidu nur post ties aprobo. La guberniestro povas prezenti al la Centra RI Konsilio sian propran opinion pri la proponita amendo.